

REDAKTORA VORTO



★

Ĉu vi memoras la heroon de unu el ĉarmaj fabeloj de fratoj Grimmoj pri tajloro, kiu per ununura bato mortigis sep muŝojn. Tiu kudris al si vastan rimenon kaj sur ĝi per grandaj literoj anoncis:

“SEP PER UNU BATO”.

La homoj ekkredis, ke li estas batalanto, kiu unufrape povas mortigi sep kontraŭulojn. Estis blufo, tamen la erarigon apogis diversaj ruzfaroj de la tajloro.

Ni jam alkutimiĝis ke kutime blufas politikistoj, sed inter blufuloj estas ankaŭ esperantistoj!

Jen en litova gazetaro oni informas, ke en Litovio estas 3 mil, aŭ ŝvele, eĉ 5 mil esperantistoj. Juĝu mem. Dum lastaj 50 jaroj en diversaj E-kursoj Esperanton eklernis 8-10 mil homoj.

La kursojn finis ĉirkaŭ 2-2,5 mil. Ĉu ĉiuj finintoj fariĝis esperantistoj (la homoj, kiuj scipovas kaj uzas la lingvon)?

Certe ne, eble ĉirkaŭ 1,5 mil.

Dum la censado en 2001 nur 858 personoj notis la regionon de Esperanto. Verŝajne ne ĉiuj, kiuj scipovas la lingvon. Tial la realo kuŝas ie meze – iom pli ol 1000!

La nombro 5, aŭ 3 mil estas blufo, tamen pli ol realigebla, se tiuj, kiuj konsideras sin esperantistoj, apogus la blufon per siaj faroj ...

★

Vytautas Šilas /Vi:taŭtas Ŝilas

LITOVA STELO

Lietuvos žvaigždė

N-ro 2 (192)

marto - aprilo 2010, XX jaro

ENHAVO

- 2 Jubileoj kaj jubileuloj
- 5 Verkanta aktorino
D. KAZRAGYTĖ
- 10 La vivo kun *RIDETO*
- 12 Kroato en Norda Litovio
- 14 Solenulino el *RUTO*
V. ŠIMAITIENĖ
- 15 Du noveletoj de
D. Kazragytė
- 19 Fondiĝis Vilna E-societo
- 20 N. Gogol en Pacurbo *Panevėžys*
- 22 Forpasis veterano A. VALA
- 23 Forpasis Ĉ. TRUČIONIS
- 24 *Leviĝu* – rakonto de
J. Kundrotas
- 28 Ekskurso por BET-anoj
- 29 Por Nobel-premio al UEA
- 30 E-mozaiko
- 31 Ridetu kune
- 32 Abono al *Litova stelo*

La fotoj sur kovrilaj paĝoj –

- sur la 1a – de Darius TARĖLA,
- sur la 2a – de Elzė RIMDŽIUVIENĖ
- sur la 3a – de Ranieri CLERICI
- sur la 4a – de Vytautas ŜILAS

JUBILEOJ kaj JUBILEULOJ

Kio estas jubileo? Estas festado de datreveno de iu grava evento. Estas jubileoj, kiujn festas tuta ŝtato, ekzemple 1000-jaron de la landnomo *Litovio*, aŭ 600-jaron ekde venko de germanaj krucmilitistoj en Grunvalda (aŭ Tanenberga, litove *Žalgiris*) batalo. Tamen la plej ofte okazas celebrado de personaj jubileoj. Imponaj estas 100-jara, 90-jara eĉ 80-jara jubileoj. Tamen malmultaj samaĝuloj ja havas ŝancon gratuli tiomaĝan sian kolegon aŭ parencon. Tial oni kaptas la okazon por publike gratuli 70-, 60-, 50-, eĉ 40-jarulon. Datrevenulojn pli ol 60-jarajn oni gratulas en 5-jara vivo periodo. Pri esceptoj poste. Nun pri tute neantaŭlonga jubileado.

La vintro jam estis forpasanta, kiam la 14-an de marto 2010 litova E-anaro kolektiĝis en kela kafejo ĉe Kaŭna Zamenhof-strato. Ne, ne en bopatra Zamenhof-domo samstrate, ĉar tie, ho ve, pro averio de hejtosistemo okazis akvoverŝiĝo. En la domo estis malvarme kaj malseke... Nu, akvoverŝiĝoj ĉiam okazas en maltaŭga tempo (aŭ kiam oni ĉesas pagi por hejtado), sed ne tio gravas. Gravas, ke la E-familio kolektiĝis por festi eĉ kvin jubileojn! Du pasintjaraj, sed ceteraj - freŝjaraj.

Fondinto de E-klubo en *Pasvalys* (norda Litovio), gvidanto de multaj E-kursoj, aktiva partoprenanto de BET-aj kaj de UK-oj, intruistino **Bronė Aukštikalnienė** restigis neforviŝeblan spuron en la litova movada historio. La 17-an de oktobro 2009 ŝi atingis la **80**-jaran vivosoĵlon.

Konata Kaŭna esperantisto, homo societema, sincera kaj justa, la denaskulo (la gepatroj estis esperantistoj!) estas **Emanuelis Dvarionas**! Oni konstatis, ke li restis fidela ne nur al tradicioj de siaj gepatroj kaj de litova popolo, sed ankaŭ al Esperanto. La 17-an de decembro 2009 li estiĝis **70**-jarulo (pri li – LS n-ro 6, 2009).

Litovaj esperantistoj bone memoras pri faroj por Esperanto de jam **85**-jara vejsejano **Albertas Stabingis** (relegu pri li en LS n-ro 1, 2010). Temas pri lokaj E-kursoj, partopreno en E-aranĝoj kaj (gravas!) eternigo de Esperanto kaj ĝia aŭtoro Zamenhof en la mondkonata urbeto *Veisiejai* (Vejsejo).

Longjare aktiva membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, partoprenato de kelkaj IKUE-kongresoj estas Kaŭna stomatologo s-ino **Irena Ŝukienė**. La 15-an de januaro 2010 ŝi pasis jam la **70**-jaron de sia vivoetapo.

Ĝis nun temis pri jubileoj de ordinaruloj. Tute alie estas pri homoj, kiuj okupas pli-malpli altan postenon. Ne tiom gravajn postenulojn oni gratulas ĉiun kvinan vivojaron, jam ekde 30-jariĝo. Sed, se tiu estas Ŝtata prezidento aŭ premiero, aŭ direktoro de grava banko, tiam tiun oni gratulas okaze de ĉiu naskiĝtago. Iuj tion faras por flati la gravulon, aliaj por propraokule esplori kiom longe ties posteno povus resti ankoraŭ okupata... Tamen, ĉar la prezidanto de Litova E-Asocio **Povilas Jegorovas** estas nek premiero nek banka direktoro liaj kunagantoj rememoras pri lia naskiĝtago nur ĉiun kvinan jaron. Ni do aklamis lin okaze de 55-jariĝo. Lia naskiĝtago estis la 11-an de marto kaj koincidis kun la ŝtata festo pri reakiro de sendependeco. Tra tuta urbo de P. Jegorovas tiam ekflirtis la ŝtataj standardoj! Jen tiel!



Tamen, tamen. Gratulad` sen bondezir` estas kiel kanto sen inspir`. Bondeziroj al niaj datrevenuloj tute ne mankis. Ekz.: “Okaze de Via 80-jariĝo ni bondeziras al Vi ĉiame bonan humoron kaj certecon, ke ne nur ni, sed ankaŭ Viaj multenombraj lernantoj kaj kolegoj memoras pri Vi!”, “Estimata Amiko, irante al novaj vivojubileoj havu fortan sanon, imitindan humoron por frandi la vivon, Vian familion kaj la mirindan lingvon Esperanto!”, “Ni deziras al Vi ĝui estimon kaj dankemon de ĉiuj, kiuj kontaktas kun Vi! Kun bona humoro, trankvile kaj nerapidante al sekva, la 90-jara jubileo”, “Ni deziras, ke espero, sano, pacienco kaj sukceso akompanu Vin en Viaj laboroj!”, “Ni bondeziras al Vi ne laciĝi kaj ne cedi al tempestoj de nuntempo. Paŝu antaŭen! Viaj 55 jaroj estas kaj trezoro kaj devigo por la estonteco”.



Ĉiuj gratulantoj scias kiel komplike estas fari bondeziron al mezaĝaj virinoj. Ĉiuj ili, ne nur 50-jaraj, aŭ 60-jaraj deziras esti konsiderataj pli junaj. La solvoj estas du – aŭ prisilenti la aĝon, aŭ gratuli ilin okaze de duobla 25-, 30- jariĝo. Al soliduloj, precipe al viroj, oni ofte bondeziras ĝisvivi 100 jarojn. Komprenu tiel – travivu ankoraŭ bagatelon – 40, 30 aŭ 20 jarojn! Bele, sed tio kontraŭas la ŝtatajn interesojn. Ja la 10-jara pensio (830 Ld aŭ 240 €) de emerito sufiĉus eĉ por tutjara salajro de la landa parlamentano. La ŝtato do estas interesigita, ke ni neniam atingu pensian aĝon... Spite al tio, ni deziru al ĉiuj, unue al kara prezidanto de LEA, ne nur atingi la pensian aĝon, sed supervivi ĝin!

Se vi, kara leganto, konkludis, ke mi maltrafe skribis pri jubileoj kaj jubileuloj, faru ankoraŭ unu konkludon – vi mem skribu pri viaj datrevenuloj – ilin vi ja konas pli bone ol mi. Skribu tiel, ke plaĉu ne nur al vi, sed ankaŭ al la jubileulo.

V. Ŝilas, redaktoro de LS



Dolorosa Kazragytė

VERKANTA AKTORINO

Kaŭna esperantistino, membro de Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio“, antaŭe ĵurnalisto, nun estro en unu el la urbaj bibliotekoj Danutė Statkuvienė paroligis populariĝintan samurbaninon, verkantan aktorinon Dolorosa Kazragytė /Kazragi:te, kiu en 1967 komencis aktori en Nacia drama teatro kaj ekde 1969 aktorin en Kaŭna drama teatro. En 1995 ŝi eldonis sian la unuan verkon. Ni prezentas al vi la intervjuon.

Vi devis fariĝi muzikistino, sed fariĝis aktorino. Kiel tio okazis?

Mi eniris konservatorion (*nun Muzika akademio* – red.) por studi pianadon, mia instruisto estis Balys Dvarionas (*grava litova komponisto* – red.). La historio estas tre simpla. Ofte instruistoj destinas aŭ direktas homan elekton. Ekde la unua klaso mi tre ŝatis deklami, sed instruistino de muziko, kiu estis tre sindona al sia profesio, ĉiam ripetadis, ke mi estas tre kapabla por muziko. Mi kantis en lernejo ansamble kaj solon. En mia urbeto *Telšiai* la sepjara muzika lernejo ekfunkciis nur kiam mi jam estis 11-jara. Ĝis tiam mi eĉ ne *do-re-mi* sciis, sed la instruistino min instigis kaj mi eniris ĝin. La sepjaran muzikan lernejon mi finis dum kvar jaroj. Tamen kiam mi komencis studi en Vilno, en muzika lernejo de Tallat-Kelpša, mi komprenis, ke teknikaj kapabloj de infanoj, kiuj ekludis jam en la kvina jaraĝo estas pli bonaj ol la miaj. Mi tutan tempon timis teknike pli malfacilajn lokojn. Mian la plej ŝatatan aŭtoron F. Chopin, kun kies koncerto mi finis la lernejon, mi ne kapablis ludi tiel, kiel mi dezirus. Ankaŭ dum studkursaj vesperoj ofte mi ne ludis – ja estis tiuj, kiuj ludis pli bone ol mi, sed legis fregmentojn de diversaj literaturaj verkoj. Tamen, post pli ol monata studado en konservatorio mi ne povis trankviliĝi kaj mi kun tremanta koro frapis la pordon de vicrektoro Irena Vaišytė por peti mian transigon al aktora fakultato. Post aldona kontrolo sinprezentiĝo oni min akceptis.

Ĉu vi ĉiam estis kontenta pri via profesio?

Mi neniam bedaŭris pri aktoriĝo. Kaj precipe jam nun, kiam mi tramalsanis teatron; mi foriris de tie antaŭ sep jaroj. Mi ankoraŭ havis kelkajn rolojn – en la spektakloj “Heda Gabler”, “Mary Poppins”. Nun mia teatro estas tiu de urbo *Marijampolė* – dum ses jaroj mi tie ludis kvin rolojn, tri el ili kun profesiuloj kaj du kun amatoroj (“Harold kaj Mode”, “Blaze”). Ĉi tiu urbo, rivero *Šešupė* iĝis proksimaj al mi, la loĝado en subtegmentejo de flegejo de St. Arkianĝelo kun tegmenta fenestro al astroj, ankaŭ la atmosfero, kie

kolektiĝas reprezentantoj de diversaj profesioj por ludi teatron. Forestas streĉiteco, envio, teatraj intrigoj – estas tre agrable. Kaj ankoraŭ - en Nacia drama teatro ni ludas laŭ la libro de R. Granauskas “Duburys” (Kavego); reĝisoro Sigitas Raĉkus spektakligis ĝin. Jam dum tri jaroj ĝi restas populara, ĝi ravas per sia simpleco, ŝajnas eĉ, ke ludado forestas – tiam ĝi estas triste reala.

**En teatro vi
kreis pli ol 30
rolojn. Kiuj
el ili plej
memor-
fiksiĝis al vi?**

*Kun aktoro
Algimantas
Masiulis.
Sceno el la
teatraĵo de
M. Untas
“Svarbiausioji
repeticija” (La
ĉefa provludo)”*



Mi povas diri unusence, ke plej memorfiksiĝis tiuj roloj, kiuj estis plej malfacile kreataj aŭ tre taŭzigitaj de kritikantoj, kiel „Ŝauksmas“ (Krio). La plej gravaj miaj dramistoj estis T. Williams kaj A. Strindberg – mi ludis en tri iliaj spektakloj. Precipe memorfiksiĝis la rolo en “Frenken Julia”, kreita preskaŭ nur dum unu semajno en la drama teatro de *Šiauliai*. Kiam mi rememoras tiun tempon, la inferon kaj ĉielon kune, la tempon de kiu nun mi estas liberiĝinta – tie mi estis kvazaŭ kamikadzino. “Frenken Julia” estis la unua spektaklo en Litovio, kiam oni por ludi invitis aktorinon el alia teatro. Mi, denove, la unua el aktoroj verkis libron “Tiltas be turėklų” (Ponto sen balustrado), kiu ricevis tre kontraŭdiran pritakson. Ne de kritikistoj, kritikistoj malatentas miajn librojn – de gekolegoj. Miaj libroj ne estas literaturo, ili estas kvazaŭ daŭrigo de rolado, rimarkoj pri vivo. Mia kolego, kun kiu mi ludis en “Frenken Julia”, aktoro Pranas Piaulokas diras “nu, pro kio vi tiel malkovras vin, por kio necesas vin tiel displaŭdi, estu mistera”. Sed mi havas tian deziron, mi tiel sukcesas. Aliaj diris “nun ni, do, kun vi devas esti singardaj, poste vi ĉion priskribos”. Mia verka bopatro estis verkisto Robertas Keturakis, al kiu mi kuraĝis montri miajn plenskribitajn kajerojn. Li diris - verku nepre. Poste mi komencis verki teatraĵojn. Jonas Vaitkus komprenis, ke mia “Pirelli” estas vera sap-opero kaj al spektantoj plaĉos. Li mem tiaĵon neniam spektakligis, sed la teatraĵo prezentiĝis, mi ricevis sakojn da leteroj, tamen kritikistaro min tute senvalorigis. Al mi tre plaĉis roloj, kiuj tute ne similis min, jen kiel Thecla (Strinberg) aŭ Blanche (Williams), ĉar mi estis tia aktorino, kiu sin apogas je intuicio kaj imago, ne je propraj travivaĵoj. Mi komprenis, ke estas du tipoj de aktoroj: unuj

mem estas tre grandaj kiel personecoj kaj dumlude restas evidentaj memoj, la aliaj, kiel mi (mi ĉiam opiniis, ke mi estas griza museto, sen havi sian stilon, aŭ ion alian) – tiuj surscene povas sin esprimi, ekbrili. Al mi plaĉis la roloj – iu ĝiba Ljuba el “Paskutinieji” (la lastaj) de Gorki, aŭ Frenken Julia, kiu fordonas sin por pasio, frenezeco kaj post tio mortigas sin. Por mi estis interese krei tion, kio ne prezentas min mem. Tamen en ĉiu homo estas tuta paletro da koloroj – de la plej obskuraj ĝis la plej helaj. En unuj pli esprimiĝas unuj koloroj, en aliaj – aliaj. Iuj koloroj povas esti nur aludoj. Vi povas trovi en vi mem Ledi Makbet kaj Dezdemonon, aŭ tiun kiel Aŭgusta en teatraĵo de Gruŝas – bonan, lirikan, amantan. Sed plej interese estas ludi personecojn, kiuj enhavas multe da kontraŭdiroj, mankoj, malbono, sed tiel esprimi la rolon, ke interne io kriegu “mi ne deziris esti tia”. Mi vidis, kiam mi estis en malliberejo – terurvizaĝa prizonulo, kondamnita pro murdoj karesis malgrandan katidon – en la vizaĝo esprimiĝis tia soleco kaj tia mildeco al tiu malgranda estaĵo. Serkve, en la profundo estas bono, tamen multo estas kripligita, eble pro vivkondiĉoj, aŭ eble pro aliaj kaŭzoj.

Morgaŭ vi prezentos al la legantoj vian novan libron, kioma libro ĝi estas kaj kiel ĝi titoliĝas?

Estos la sesa libro “Ramybės nerimas” (Maltrankvilo de trankvileco), kiun eldonis eldonejo “Tyto alba”. Estas tekstoj verkitaj ekde 2006 ĝis 2010. Mi ne estas verkistino. Ĉiuj miaj libroj estas eseoj, noveletoj. Tien eniras kaj aŭtentikaj historioj, kaj fantaziaĵoj, estas impresoj de teatraj provludoj, de premjeroj, de komunikado. Estas vilaĝo kaj ties homoj. Kiam mi verkas? Kiam mi ekvidas katinon kun tri piedoj, io fariĝas interne kaj mi ekdeziras verki. Tamen iam mi ekvidas multon, sed tutegale mi verkas nenion. Iam sufiĉas aŭdita muzika pasaĵo, aŭdita historio, alko renkontita en arbaro. Iam mi eksaltas nokte kaj per kraĵono aŭ iu skribilo mi skribas, skribas. Mi dormas sur matraco surplanke, al mi plaĉas ĉion dismeti sur la plankon, submane estas ĉiuj skribiloj. Oni proponis al mi aliĝi la verkistan asocion, sed mi diras “mi ne povas, tio estos la maŝo surkola, ne – mi estas terure devokonscia homo, tiam mi sentos la devon verki, ĉar mi estas verkistino, nun mi povas verki kiam mi ekdeziras”.

Vi menciis, ke vi liberiĝis el la stato, kiam vi estis “inter ĉielo kaj infero”?

Post maturaĝo venis liberiĝo de pasio. Se vi senbride ion deziregas, ne gravas kion, monon, gloron – vi jam estas en kaptilo de satano. Sed se vi eĉ entreprenadon plenumas trankvile, sen interna brulanta fajro, juste, kun estimo al ĉirkaŭuloj, se vi zorgas pri viaj subuloj, tio povas esti tre krea procezo kaj kune ankaŭ profita. Same estis ankaŭ en teatro – precipe ĝis kiam forestis kredo. Ĝis kiam mi opiniis, ke estas nur mi kaj mia talento, kiam ĉiufoje necesis pruvi mian talenton, mian eksterordinarecon. Jen tion faris mi, kaj - vi atendas valortakson de tio. Do, kiam ĉio trairas vin, tra via memamo, ambicio, estas terura afero, ĝuste tio estas la vivo inter ĉielo kaj infero. Mi ne dirus, ke mi plene saniĝis: plaĉas al mi, ke oni legas la librojn, ankaŭ kiam oni min haltigas, sed tio fluas jam trankvile, kiel rivereto. Mi ekaŭdas komplimentojn – estas bone, se ne – ankaŭ bone. Ne plu estas tia pasio pruvi min. Tiam aperas la ĉiela vestiblo. Sur teatra scenejo vi estis kvazaŭ en ĉielo, vi flugas ... Kaj la atendado de rolo, simile al malsatega hundo. Ja vi mem ne prenos ĝin, vi devas plaĉi al reĝisoro, vi turmentiĝas pri tio, ĉu vi plaĉas aŭ ne, ja flati ne

permesas La digno, ja mi deziras demonstri, ke mi ne fleksiĝemas. Jen kiaj araneaĵoj ekzistas en teatro kaj tio similas inferon.

Kial la libron vi titoligis „Maltrankvilo de trankvileco“. Ĉu tio signifas, ke trankvilo kaj maltrankvilo estas ne disigeblaj?



La titoloj venas sensie de ie. Speciale vi ne elpensas. Kiel mi komprenas, la ordinara trankvileco estas terura afero – nu, post kiam plenkreskas la infanoj mi ne plu havu iujn sindevigojn, mi povu treni horojn en somerĝardeno. Sed, ŝajnas al mi, ke ankaŭ tiaj homoj ne estas trankvilaj, ili trompas sin mem. Trankvileco forestas entute.

En Kaŭna regiona biblioteko aktorino Doloresa Kazragytė prezentas sian esejon „Maltrankvilo de trankvileco“

Jen en buso mi aŭdis du interparolantajn virinetojn: “mi veturas al doktoro, mi bezonas ke li preskribu *tazepamon*, mi ja neniel povas ekdormi, kial, vi diru, ja ĉio bonfartos kaj de kie tiu maltrankvileco?” Post liberiĝo de tiu orgojlo, de tiu ardeco pri kiu mi parolis, venas iusence la trankvilo, ja al vi sufiĉas tio, kion vi havas. Min kontentigas komunikado kun homoj en bibliotekoj, en vilaĝaj regionoj, oni ĉiam invitas min, invitas kaj ne plu estas aspiro, ke min invitu jena aŭ alia reĝisoro. Ne plu estas pasio esti aktorino, bele aspekti. Tia trankvileco venas tiam, kiam vi trovas Dion, kredon. Kiam vi konscias, ke la recenzoj, flatlaŭdoj entute malgravas. Alisence la trankvilo estas konscio, ke vi fakte postiom foriras. Kaj estas trankvilo, kiam vi scias, ke vi foriras al ia alia ekzistado, kiu vere ekzistas.



Kio por vi estas kredo, kiel vi trovis ĝin?

La kredo venas aŭ ne, vi ĉi tie nenion povas fari, kredon ne eblas elvoki. Estas simple senso, ekzistas diversaj tuŝoj kun forto, energio, ia komunikado, mankaresoj. Mia trankvileco estas ĝuste kredo. Mi subiĝas al la fluado. Ekzistas tiu akso, spirito, kiu kvietigas pasiojn, kiu aldirektas vin. La animo tutegale restas maltrankvila, en ĝi tutegale baraktas tristoj, timoj, kio estos poste, maltrankviliĝo pri proksimuloj, kvankam vi nenion povas fari, kiel mi pasigos mian tempon, kaj kiel mi mortos, kaj kio estos poste ktp. Tamen la spirito scianta la vojon tuj haltigas vin, krome ekzistas aliaj rimedoj, preĝo, foriro al arbaro, rigardado al akvo, al steloj, libro, muziko. Vi povas per ĉiuj ili bremsi la maltrankvilon, tiun galopantan ĉevalon. La kredo estas Dia favoro. Vi mem ne alvokos ĝin. Mia panjo diradis, “kiel mi dezirus kredi, sed mi ne povas”. Mi opinias ke multaj homoj venas al kredo tra sufero. Ankaŭ mi ricevis kapobaton – everio de la filo, kelkaj diurnoj senkonscie, kaj mi, nekredanto, falis sur genuojn kaj komencis voki helpon de Jesuo. Tiam mi eksentis iun strangan kupolon super mi, kvazaŭ aŭspicion, amon kaj trankvilon, mi sciis, ke estos bone, ke ĉi-foje mi estos kompatita. Mi eksentis la blovon de Ĉiapotenco, de kiu vi dependas – la morto, la naskiĝo ne apartenas al via volo. Poste mi tralegis multe da libroj, mi interesiĝis pri verkoj de aliaj religioj, ĉio venas de unu fonto, kredis ja la plej grandaj scienculoj Einstein, Pascal. Al mi plaĉis la vortoj de Papo Benedikto XVI, kiam al demando kiom da vojoj estas al Dio, li respondis “Tiom da, kiom da homoj”. Mi ne ŝatas preĝi grupe, ne plaĉas al mi esti inter homoj en preĝejo, mi elektas pli solecan lokon. Mi kiel volontulino iras al Radio Maria, kie mi legas elektitajn de mi tekstojn, mi legas tion, kio plaĉas al mi. Tie estas tre agrabla medio, agrablaj homoj. Mi piediras tra *Aŝuolynas* (*kverka parko* – red.), tra la tuta Kaŭno ĝis la malnova urbo, tie mi dum kelkaj horoj iom legas kaj denove revenas piede. Mi bezonas moviĝon, mi ne ŝatas longe esti en unu loko, mi tre multe piedumas kaj en la urbo kaj en vilaĝo, en arbaro mi povas iradi dum kvar-kvin horoj. Tuta *Labanoras*-arbarego, ĉiuj ĝiaj marĉaj arbus-tarejoj estas de mi travagitaj. Ankaŭ vintre mi iras laŭ glaciigintaj lagoj, sed vintre estas iom malĝoje, kaj ne eblas esti longe eksterhejme.

Ĉu vi havis la okazon aŭdi pri internacia lingvo Esperanto, renkontiĝi kun esperantistoj?

Eble antaŭ kvardek jaroj en gazetaro mi legis pri ĉi tiu lingvo, mi eĉ memoras, estis io kvazaŭ lecionetoj, mi legis vortojn, kiuj similis al latino, ŝajnis iom strangaj. Tamen ĉar mi “ardis nur pri teatro”, por iuj aliaj hobiaj la tempo forestis. Kaj nun mi nenion aŭdis, povas esti mi preteratentis, eble mi ne interesiĝis, tial mi estus pensinta, ke Esperanto jam ne plu estas uzata. Tial mi estis mirigita, ke en Esperanto eĉ revuo estas eldonata. Mi ne emis lerni lingvojn, pro tio eksterlande, kiam mi ne povas interkompreniĝi, mi sentas min nebone. Mi dezirus vojaĝi al Rusio, jen tie mi povus satparoli, mi povus kun kiu ajn vilaĝa homo interparoli, sataŭskulti diversajn historiojn.

La fotoj sur la paĝo 8 – de Rasa Ambrazienė

LA VIVO KUN RIDETO



Ĉiujare esperantistoj de la klubo “Ruto” en *Šiauliai* organizas Postpaskan feston “**Rideto**”, kiu ĉi-jare okazis la 10-an de aprilo.

En la aranĝo partoprenis ĉirkaŭ 40 geesperantistoj kaj iliaj infanoj: krom ŝiaŭlaj esperantistoj en la festo partoprenis Gražina Opulskienė kaj naŭ ŝiaj lernantinoj el *Mažeikiai*, alveturis ankaŭ multe da esperantistoj el *Panevėžys* kaj konstantaj partoprenantinoj de nia Postpaska festo Irena Butnorienė el *Nova Akmenė* kaj Regina Rozentalienė el *Joniškis*.

Ĉi-jara “Rideto” estis dediĉita al Postpasko kaj konatiĝo kun la gastiganta lando de venonta Universala Kongreso – kun Kubo.



La aranĝo komenciĝis en la kulturdomo de la urbo *Šiauliai*, kie troviĝas klubejo de “Ruto”. Post registrado de partoprenantoj, interkonatiĝo, komuna fotado sur la ŝtuparoj de la kulturdomo ni ekskursis al la *Aušra*-muzeo, kie ni kun helpo de la muzea ekskursgvidantino konatiĝis kun la ekspozicio de manfaritaj kurtenoj de litovaj virinoj (plej malnovaj eksponaĵoj estas faritaj antaŭ jarcento), ekspozicio de tre bele diversteknike farbitaj Paskaj ovoĵ kaj maskoj de Karnavala Mardo.



La lasta parto de la aranĝo – amuza vesperumo okazis en la ejo de Konfederacio de Ŝiaŭlaj neregistaraj organizacioj, kies membro estas nia klubo “Ruto”. La vesperumon gvidis prezidanto de la klubo “Ruto” Gediminas Kazlauskas kaj lia edzino Reda Kazlauskienė. La ejo de vesperumo estis ornamita per Kubaj flagetoj, diversaj fotoj kun vidaĵoj de naturo kaj vivo de Kubo. La partoprenantoj per diversaj akcentoj de siaj vestaĵoj kreis Kuban etoson. La vesperumon komencis la plej juna partoprenanto Augustas, la fileto de geKazlauskasoj, kiu ekkrulis Paskan ovon laŭ planko de vesperumejo.



Kubon ni pli multe ekkonis, partoprenante en la kvizo pri Kubo, kantante esperante tre popularan Kuban kanton “Guantanamera” kaj lernante danci la Kuban dancon “Salsa”, gvidataj de Vida Kulikauskienė el *Panevėžys*.

Postpaskon ni eksentis, ludante ruladon de Paskaj ovoĵ, partoprenante en la konkurso pri plej bele ornamita Paska ovo, rigardante infanajn desegnaĵojn pri Pasko, pentritajn de ili dum la vesperumo.

Rutanoj estas tre dankemaj al Palmira Lukoševičienė el *Panevėžys*, kiu dum la aranĝo prezentis verkojn de sia edzo Telesforas Lukoševičius. Ŝi donacis multe da libroj por nia klubo, ankaŭ al kelkaj niaj geklubanoj persone kun siaj dediĉaj surskriboj.

La aranĝo okupis tutan tagon. Reveninte hejmen ni longe sentis agrablan kaj amikcan esperantistan etoson.

Klaudija Margevičienė, *Ŝiauliai*

KROATO EN NORDA LITOVIO

Invitita de litovaj samideanoj Kroata esperantisto Vlado Jurkovič pasigis unu monaton en Norda Litovio kaj en ĝia kultura kaj ekonomia centro Šiauliai.

Kultura programo „Novaĵoj el Kroatio“

Mi deziras rakonti pri kelkaj interesaj okazintaĵoj. Dekomence mi havis honoron viziti municipan publikan bibliotekon de urbo *Šiauliai*. Tie ĉi okazis kultura programo „Novaĵoj el Kroatio“, kie mi prelegis. Dum tiu tempo en biblioteko ekfunkciis pormonata ekspozicio „Kroatio – la lando de kontrastoj“. La ideo okazigi tiun programon venis de nia samideanino, bibliotekistino N. Petraitytė, kiu kelfoje vizitis nian landon kaj trovis diversspecajn materialojn por tiu aranĝo. La programon volonte kontribuis lokaj esperantistoj de la klubo „Ruto“. La elektita temo pri kontrastoj de Kroatio kaj Litovio estis sufiĉe interesa, kaj ĉeestintoj serioze aŭskultis. Ni eksciis pri la kontrastoj de niaj geografiaj regionoj, pri diverssecoj de niaj kulturoj, tradicioj, socia vivo kaj turismo. Partoprenintoj interesiĝis pri ĉiutagaj problemoj, vivmaniero kaj kulinaria heredaĵo de kroatoj. La vizitintoj aŭskultis kaj lernis viglajn kroatajn eldirojn, proverbojn kaj modernajn kantojn. Estis prezentitaj kantoj de Arsen Dedič.



Vlado Jurkovič (centre) en la biblioteko

Ekspozicio „Kroatio – la lando de kontrastoj“

En la ekspozicio estis montritaj libroj de kroataj verkistoj, tradukitaj en litovan lingvon: la fama poemo “Judita” de renesanca poeto, komencinto de nia beletro Marko Marulič, “Ponto de Drina” de Ivo Andrič, kelkaj romanoj de Miroslav Krleža. Interese, ke antaŭpasintjare en *Vilnius* oni surscenigis teatraĵon de Krleža “Gospode Glembajevi”. Bedaŭrinde, lia romano “Banket u Blitvi” (Bankedo ĉe Blitvoje), kies eventoj procesis en antaŭmilita Litovio (!), restas dume netradukita. Oni eksponis ankaŭ nuntempajn beletraĵojn “Dvori od oraha” (Avelarba bieno, 2006) de Miljenko Jergovič, “Ministarstva Boli” (Ministrejo de doloro, 2007) de Dubravka Ugresiĉ. Al tiu ĉi temo reeĥas la romano

“Balandžio plazdėjime” (En flirtado de kolombo, 2002) de konata litova beletristo Vytautas Bubnys, kiu subtile priskribis homajn sortojn dum militaj eventoj 1991 en Kroatio (!). Kulturajn rilatojn inter du niaj popoloj ligas tradukistino Mirjana Bračko. Dank` al ŝi la menciita romano aperis en kroata lingvo. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi tradukis kaj kompilis antologion de litovaj prozistoj “Via Baltica” (2006).

Mi ĝojis, ke Esperanto estis elektita kiel labora lingvo por tiu ĉi aranĝo. Interpretis ŝaŭlianino Raimonda Gžimailė. Mi do havis eblecon paroli ankaŭ pri agado de nia kroata esperantistaro. Memorindas, ke akademiano Dalibor Brozovič en 1959 publikigis artikolon „Zamenhof kaj litova lingvo“. Krom tio en la ekspozicio estis prezentitaj niaj esperantaĵoj – du novaj grandvortaroj de Lucia Borčič, “Kompendio de la Esperanta gramatiko” de M. Manner-Mamužič, “Cent jaroj de kroata literaturo en Esperanto”, ĵurnaloj “Tempo”, “Zagreba esperantisto”, “Internacia Fervoĵisto”. En fino de la programo multaj volonte partoprenis en kvizo-krucvorto pri Kroatio.

Vizito ĉe litovaj popolmetiistoj

Sekvontfoje mi vizitis simpatian kaj gajan familion de popolmetiistoj Angelė kaj Aleksas Steponavičius. Ilia loĝejo aspektis kiel eta artgalerio. Impresis ilia memfarita memblaro kaj tuta internaĵo. La paro interese rakontis pri litovaj ornamaĵoj, pri unika faradmaniero de lignaj ornamataj kuleroj kaj subtilaj papertondaĵoj. Ni gustumis tre raran sukcesan brandon kaj hejmfaritan herban trinkaĵon.

Valora prelego

Fine mi ĉeestis kunvenon de la klubo „Ruta”, kie ni aŭskultis prelegon de profesoro Aloyzas Gudavičius „Verda koloro en litova lingvo“. La profesoro ĵus estis elektita kiel sciencisto de 2009 jaro en la loka *Šiauliai*-universitato kaj ricevis internacian premion de la fama lingvisto Paŭlo Ariste. La preleginto pritraktis ankaŭ historion de verdecio en Esperanto.



La gasto en “Ruto” inter V. Ŝimaitienė kaj A. Gudavičius

Mi ĝojas, ke en la malgranda urbo *Šiauliai* ekzistas amikemaj samideanoj. Pere de nia kunlaboro ni komencis kompili litovan – kroatan konversacian libreton. Tio realiĝas dank` al Esperanto.

Vlado Jurkovič, Zagreb - *Šiauliai*

Vanda, solenulino el "Ruto"



Komence de marto
gesamideanoj el la klubo
"Ruto" celebris la 70-jaran
jubileon de la kluba aktivulino
kaj ekspedagogino
(instruistino de elementaj
klasoj)
Vanda **Šimaitienė**
(surfote – ŝi en sia hejmo).

Vanda Šimaitienė nakiĝis la 25-an de februaro 1940 en urbeto *Lygumai* (regiono *Pakruojis*). Dum 1958 – 1962 ŝi studis en Pedagogia instituto de *Šiauliai* (nuntempe *Universitato de Šiauliai*) kaj tie akiris profesion de pedagogo. Post la studado ŝi pli ol 40 jarojn instruis en diversaj lernejoj de la urbo *Šiauliai* kaj ankaŭ en aliaj urboj.

Printempe de 1995 Vanda finis E- kurson (gvidis P. Stasiūnas) kaj aktive eniris en la klubagadon. Ŝi prenis memvole multajn organizajn klopodojn de la klubo sur siajn ŝultrojn. Precipe profesian inventemon ŝi demonstris, organizante tradiciajn printempajn postpaskajn kunestadojn „Rideto“. Vanda partoprenis en BET-oj (1996, 2005), laboris kiel helpantino en UK-90 en Vilnius. Ŝi estis ĉiam elektata en la kluban revizian komisionon. La filino Daiva, instruistino de la angla, tre favore traktas okupiĝon de sia patrino pri Esperanto.

Vanda ŝatas memstare aŭ kun samklubanoj ekskursi kaj turiste vizitadi diversajn landojn ankaŭ niajn respublikajn regionojn. Ŝi mem estas sperta ekskursgvidantino.

Komence de marto ni renkontiĝis en nia klubejo por gratuli nian jubileulinon kaj donacis al ŝi florojn, varmajn bondezirojn. R. Rutkauskas tiuokaze tralegis belajn versojn, prof. A. Gudavičius dediĉis al la jubileulino kaj ni ĉiuj interesan kaj enhavoriĉan lecionon pri signifo de verda koloro en Esperanto kaj aliaj lingvoj, ni kune kantis popolan kanton „Peonio verda“, iam esperantigitan de nia fama samurbano V. Vaitiekūnas. Ni partoprenis en kvizo pri floroj, deklamis diversajn versojn. Memorindan, belan etoson por ni ĉiuj helpis krei O. Briedytė, kiu akompanis nian kantadon per litova popola muzikilo *kanklo*.

Geklubanoj de „Ruto“ kore bondeziras por la samideanino Vanda pluan ĝisnunan aktivecon kaj fidindan sanstaton.

Multajn jarojn al vi, Vanda!

*Romualdas Rutkauskas
Klaudija Margevičienė*

Doloresa Kazragytė

33 MALFELIĈOJ

En teatraĵo „Onklo Vanja“ de Anton Ĉeĥov estas la heroo Vaflja, kiun oni moknomas „33 malfeliĉoj“. Li ĉie tuŝkroĉiĝas, ion renversas, frakasas, elverŝas, forpuŝas, falas ktp. Kaj tiel ĉiu-tage. Tiaj tagoj okazas al ĉiu. Al unuj ĝi estas la 13a tago, al la aliaj – lundo, por aliaj estas malbona iu fazo de la Luno kaj simile. Tamen tian tagon kiel ĉi tiu (mi kun teruro ĝin rememoras), mi ankoraŭ ne havis.

Mi nomis tiun aĉan ŝercemulon “diablero” aŭ “koboldeto” kaj penas ĝin forgesi. Dio gardu, ke mi ne koleru kaj ne blasfemu, ĉar aliokaze ĝi ne dekroĉiĝos.

Vespere mi ĉiam starigas ĉe la lito glason kun suko. Tiu-matene, kompreneble, la glaso forglitis el la manoj kaj ĉio elverŝiĝis sur la litaĵon. „Ah, ne gravas, – mi ekridetis tute ne ekscitiĝinte, – iam okazas.“

Kaj kolomboj jam sidas ekstere sur la fenestrobreto kaj atendas, kiel kutime, ĉiu-matenan grion. Mi fortondas angulon de la gria saketo, malfermas la fenestron, kaj mi eĉ ne elŝovis la manon tra la fenestro, kiam la saketo disŝiris kaj... la tuta grio elverŝiĝas sur la plankon, sub ŝranketojn, ĉirkaŭ fornelo... Mi ŝvitlaboregis tutan horon: mi balais, suĉpurigis, tiradis la ŝranketojn, nu, mi pensas, almenaŭ la kuirejon mi iomete ordigis, ĉiujn angulojn elpurigis. Bonege.

Mi lavas min. Mi ŝmiras la vizaĝon per kremo: kial tiu kremo estas tia glueca kaj fluida? Klariĝis, tio estas ŝampuo. Hieraŭ mi aĉetis la ŝampon anstataŭ la kremo, ĉar la pakumoj similis. Nu, tio estas nur bagatelaĵo. Kantante mi lavis min, nur ekpensis: „Kio fariĝas kun mi hodiaŭ?“

Mi iras por provludo. Piede, malsupren laŭ ŝtuparo, laŭ *Donelaitis*-strato, laŭ *Laisvės Alėja*-avenuo. La unua neĝo. Descendante laŭ la ŝtuparo mi ekvidis: knaboj sur monteto interĵetadas per neĝbuloj. Mi kuntiriĝis. (Mi konas tiujn bubojn!) Ekde la lernejoj jaroj mi timas „bapton“ per la unua neĝo. Ĝuste tiel! Unu el ili ĵetas neĝbulon al mia dorso. Mi ekŝanceliĝas. La ŝtuparo estas glita, mi falas kaj glitumas postaĵe tra kelkaj ŝtupoj malsupren. La knabaĉoj ridegante diskuras. La postaĵo estas malseka. Evidente mi frapis spinan vertebron – doloras. Mi lametas. Mi jam domaĝas min iomete: „Kial mi estas tia mizerulino?“ – mi ĉagreniĝas.

Mi provludas. Ĉio estas bone. Mi revenas hejmen – ankaŭ piede. Necesas viziti vendejon „Drogas“ por aĉeti kremon. Mi aĉetis. Tamen kiu elpensis la pardon vitran kaj eĉ senkadran? La larĝan, kunfluiĝantan kun la fenestroj? Kio fariĝas kun mi? Mi misvidis, kvazaŭ la pordo estas aperta. Kaj mi kapbatis tiun „vitron“ (kia vitro, ne rompiĝis?) – eĉ la kasistino ekveis, ŝajnis, la tuta vendejo ekskuiĝis. Mi nur: „Pardonu, pardonu“, – kaj mi eliras ridante. Estas ludo. En la okuloj – larmoj, la tubero kreskas kvazaŭ fungo post la pluvo, mi estas malfeliĉa, tute malespera.

Irante mi rimarkis – zipo de la ŝuo difektiĝis, tamen tio estas bagatelaĵo.

Mi haltigis buseton, kiu veturigis min tute laŭ aliaj vojoj – al la Okula Klinik.

Mi piedumas reen la trioblan vojon. Bagatelo, mi iom spiros freŝan aeron.

Mi jam staras antaŭ mia pordo. La ŝlosilo malestas! Ĝi *devas esti*, sed ne estas. La unusola. Sinjorino Lina (kies loĝejon mi luas) estas en Usono, revenos en majo. Mi ĉion traserĉis, mi manpalpumis la mansakon, poŝojn – ne estas, kaj la pordo estas blendita. Mi reveturas al la teatro, en la salono mi trovas okulvitrujon, evidentiĝis, mi restigis ankaŭ kosmetikan saketon, kaj en ĝi – jen la ŝlosilo! Mi estis feliĉa. La ŝlosilo! Ĉio cetera estas bagatelo.

Hejme. Mi lavas min, transvestiĝas, manĝas. Ho, kiel bone: la muziko ludas, mi havas interesan libron, estas trankvile, varme en la lito. Mi sentas – iaodoro. Io brulas! Vere, estas tiel. Mi metis sur la fornelon lakton por boligi (mi deziris produkti pudington). La kuirajo kovris la tutan fornelon, la poto tiel brul-difektiĝis, ke mi devos ĝin forĵeti. Mi purigis la fornelon verŝajne 20 minutojn. Mi estis trankvila, trista, vere “frenezeta”. „Kaj tamen tutegale ĉio estas bone. Kaj tamen estas bone vivi! Tamen ci ne venkos min, koboldaĉo“, – mi balbutis enpense. „Trankvilon, Karlsono, trankvilon“, – mi ekmemoris la desegnofilmeton.

Mi enlitiĝis. Mi legas. La okuloj fermiĝas, kvankam ankoraŭ estas iom tro frue. Mi estingas la lumon, la muziko ludas, trankvilo...

La telefono! Mi saltas al tiu poŝa, kiu skuiĝas, kriegas (alie mi ĝin ne aŭdas, kiam ĝi estas en la mansako), tial mi metas ĝin ĉe la fenestron, pli fore de la lito kaj ... mi tiel terenfalas! Alkroĉiĝinta al konduktila longigilo. La lampeto frakasiĝis al malgrandegaj vitreroj, la piedan fingron mi tiel ekbatis al tabla kruro, ke mi eĉ ekhurlis. Kaj mi ne eltenis: mi tiel ploris, tiel plorĝemis, laŭte, kiom la koro deziris (ja mi estas sola), ke al mi iĝis leĝere, leĝere, trankvile kaj bone. Mi iĝis „enpenŝiĝinta“, kvietaj kaj... sen ajnaj pensoj. Strange, sed mi baldaŭ fermis la okulojn kaj dormis ĝis la mateno sen ajnaj dormigiloj. Jam antaŭ longe mi tiel dormis.

Ĉu tio ne estis „rekompenco“ pro ĉiuj malfeliĉoj?

KAJ TAMEN TIO ESTIS!

Apud malnova juda tombejo en *Kaunas*, kie printempe ĝis kapturiniĝo ebriiĝas florantaj padusoj, staras preĝejo de Sankta Antono. En ĝi estis ligna skulptaĵo de Sankta Virgulino Maria: la Sankta Bebo kaj Maria kun kronoj. Mi aŭdis, ke en komenco de la 20a jarcento ĝin skulptis neprofesia artistino mutulino.

Post fondiĝo de monaĥejo en *Palemonas*, la skulptaĵo (kiu pli frue apartenis al la monaĥejo) revenis en la novan preĝejon de *Palemonas*. Pli ĝuste, tiam ankoraŭ nur en subteran kapelon. Ĉi tie estis celebrataj mesoj.

Foje, surstrate, oni donis al mi iun bildkarteton. Do mi vidas sur ĝi – la saman skulptaĵon de sankta Maria. Kaj surdorse mi legas: iam la skulptaĵo ploras. Aperis postsignoj de la larmoj. Mirinde! Miraklo! Mi eksentis internan koleron, reziston: en Italio skulptaĵoj ploras, en Japanio ploras, ankoraŭ ie ankaŭ ploras... Kompreneble,

ankaŭ en Litovio ili devas „plori“ – ja ĉi tie estas „La Tero de Maria“, „La Norda Ateno“!

Incitiĝinta mi skuveturas per malnova aŭtobuso al *Palemonas*. Mi devas esplori.

Mi eniras en la kelan kapelon. Mi tuj ekvidas en la maldekstra flanko, ĉe la altaro, mian skulptaĵon. Dekstre – skulptaĵon de sankta Johano Bosko. Oni povas aliri kaj bone pririgardi. La meso komenciĝos nur post kelkaj minutoj, nur kelkaj virinetoj sidas.

Mi aliris. Mi eĉ ne surgenuiĝis kaj ekgapis impertinente al la vizaĝo de la skulptaĵo. Mi tuj ekpensis, kiam ondo de kolero surfluis min: „Estas falsaĵo! Evidente, per peniko estas pentritaj „larmaj padetoj“ sur la vangoj. Neniaj larmoj ĉi tie estas! Falsaĵo! Trompo! Stulte! Honte! Kiel oni povas tiel?!“ – ktp. La koro ial skubatis! Kiel lavbatilo.

Komenciĝas la meso. Ne decas ĉi tie stari kaj indigniĝi, la virinetoj jam rigardas al mi, sed ne al la sacerdoto. Mi iras al malantaŭo de la preĝejo. Mi koleras. Tamen estu tiel, mi traaŭskultos la meson, se mi jam alvagaĉis ĉi tien.

Mi aŭdas nenion, kion diras la sacerdoto, mi nur malkontentiĝas, flamiĝas, ĵetrigardas al la skulptaĵo kaj estas deziro ĉion simple ĉesigi, ion fari, ja ... ne licas tiel mensogi!

La hostilevado. Silento. Bondeziroj pri la Trankvilo. Kia ankoraŭ estu „trankvilo“? En mi brubolas ĥaoso de sentoj.

Por la komuniigo etendiĝis negranda viceto. Mi staras. Kompreneble, mi ne iros. Mi ja ne povas iri kun tia humoro kaj mi eĉ ne deziras.

Mi ne scias kial, ne scias kiel, tamen kvazaŭ la piedoj mem portis min al vicofino. „Iru de ĉi tie! Iru!“ – flustras la voĉo en mi, sed mi restas. Mi ricevas la komuniojn. Ĉi tie, proksime de la skulptaĵo mi surgenuiĝis (pli ĝuste, mi eksidis sur la kalkanojn, kvazaŭ iu muzulmanino). Mi klinis la kapon, por ke mi vidu nenion. Ial mi hontas, kvazaŭ mi agas ne tiel, kiel devus, kvazaŭ mi deziras kuri de ĉi tie kaj jam ne plu deziras, mi ne povas. La koruseto kantas kortuŝan preĝkanton. Mi levas la kapon. Kaj mia rigardo pikas rekte al la okuloj de Maria. Mi ekvidis la okulojn plenplenajn da larmoj. Ili apenaŭ sin tenis en la okulkavoj... tuj tuj ili ekfluos laŭ la vangoj. La veraj, plenaj da larmoj okuloj... sendube veraj. La okuloj, dronintaj en larmoj.

Kiom longe mi rigardis? Kelkajn sekundojn? Minutojn? Mi nenion sentis. La tempo haltis. Sonoj malaperis. Mi ne povis deteni alfluintan ploron. Mi komencis plorĝemi. La menso denove funkciis. Mi sentis, ke homoj rigardas al mi, la sacerdoto finas la meson, benas... Kaj mi hontas, ke mi ploras, kaj mi ankoraŭ pri io bedaŭras, neimageble bedaŭras... Mi eltiras naztukon, iras flanken. Mi trankviliĝas.

Mi ne scias, kio okazis. Kio ĉi tie okazis? Kial mi ploris? Mi ekstaras. La meso estas finita. La virinetoj disiras.

Mi ekrigardas nekuraĝe al la skulptaĵo... Kaj ... nenio. Jam nenio estas, ĉio estas kiel estis – la samaj iom farbitaj vangoj... la okuloj.

Tamen en mia interno jam reĝis ĝojo, ial mi fartis gaje, mi ekridetis (preskaŭ eĉ ekridis duonvoĉe), mi preskaŭ ekpalpebrumis al la skulptaĵo: „Pardonu, – mi diris mallaŭte, – mi ne esploras Vin plu. Al mi estas tutegale, ĉu Vi ploras, aŭ ne ploras. Ĉu Vi estas falsita aŭ ne... Pardonu mian impertinentecon.“

Ĉar... Tamen estis tio! Estis la momento por mi destinita. Ie... malproksime aŭ proksime, en niaj koroj aŭ en altecoj de la ĉielo, aŭ ankoraŭ en iu alia realeco Vi, la plej tenera universa Estaĵo, ploras, rigardante al la mondo, al niaj frenezaĵoj, al nia malkredo.

Iluzio? Fantazio? Eble. Ĉu estas diferenco? Kaj de kie venis tiu fantazio?

Tio estis. Kaj ĉio. Mi ofte vokas tiun realecon en mia imago, ĉar nur ĝi povas helpi forpuŝi horojn de malkredo.

Mi povas multon forgesi. Kaj mi forgesas, eĉ la plej feliĉajn momentojn de la amo en mia vivo.

Ĉi tiujn larmojn mi ne forgesas. Mi ne forgesos. Tio estis! Certe estis.

Noveletoj de Doloresa Kazragytė
esperantigis **Antanas Grincevičius**

BARELO Por eldiri opinion ne serĉu barelon sur bazara placo...

En 2008 Antanas GRINCEVIČIUS, esperantisto el la litovia ĉefurbo Vilnius, komencis realigi altnivelan retgazeton por la mondo pri Litovio sub la titolo *BARELO*. Do, la retgazeto simile al la revuoj "Monato" aŭ "Kontakto" skribas pri temoj diversaj en Esperanto.

La "blogoj" prezentas interesajn kaj aktualajn eventojn en Litovio. Esperanto-temoj tie ankaŭ ne estas fremdaj. Efektive "Barelo" estas imitinda ekzemplo de praktika utiligo de Esperanto. Apenaŭ ekzistas io simila en aliaj landoj. La retgazeto estas profesie farita. Ĉiu artikolo (blogero) estas trafite ilustrita. En la retgazeto eblas legi interesajn kaj aktualajn artikolojn pri historio, kulturo, naturo, arto, ekologio, ekonomiko, politiko, energetiko, festoj, folkloro, fotografio, lingvo, literaturo, muziko, scienco, sporto k.s. de Litovio. - entute estas 51 ŝlosilvortoj, el ili 5 estas Esperanto-rilataj. Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de la aŭtoro mem. Estas bona ekvilibro inter diversaj temoj. Ekde la lanĉo de la retgazeto la 10-an de oktobro 2008 ĝis la 18an de februaro 2010 en ĝi estis publikigitaj 84 artikoloj, 12 el ili ligitaj kun Esperanto). La retgazeto havas ligojn al aliaj retejoj pri fotoj, tradukado, lingvaj problemoj, diversaj TTT-ejoj, esperantistoj, literaturo, tekstoj, gazetaro, E-radioj k.s. Ĝi do meritas multe pli da atento ol ĝi havis ĝis nun, ĉar pro la modesteco de la aŭtoro ĝi ne estis sufiĉe reklamita.


La retgazeto "Barelo" legeblas ĉe <http://barelo.blogspot.com/>.

La retadreso de la redaktoro de "Barelo" estas: grinanta@gmail.com.

Povilas JEGOROVAS

FONDIĜIS VILNA ESPERANTISTA SOCIETO

La 11-an de februaro 2010 estis jure registrita **Vilna Esperantista Societo** (litove: Vilniaus esperantininkų draugija –VED; identiga numero: 302480309). Oficialaj fondintoj estis pasintjarcentaj membroj de Junulara E-klubo “Juneco” **Sigitas Žilionis**, Laimius **Stražnickas** kaj Vytautas **Šilas**. La unuan laboran kunvenon S. Žilionis, la prezidanto de VES, okazigis la 16-an de marto, en kunsidejo de la Vilna Mickevičius-noma biblioteko. Tiam VES ekhavis entute 12 membrojn. La bezono fondi la societon aperis pro tio, ke la iama klubo de Vilna Filio fakte mortis.



S. Žilionis kun registraj dokumentoj



La unua, labora kunsido de Vilna Esperanto Societo. Foto de A.Karpovas

La nova VES, laŭ sia statuto, intencas daŭrigi la plej bonajn tradiciojn de antikva VES, kies honora membro estis L.L. Zamenhof mem. Laŭ la statuto la nova VES rajtas fari tre multe, ekz., organizi diversajn instruadojn, E-aranĝojn, okupiĝi pri eldonado. Dume la prezidanto kaj la membroj ne estas ambiciaj ĉi-rilate. Estonto montros, kiom viva kaj aktiva estos ekagonta VES.

Estas simbole, ke la unua kunveno de VES okazis en biblioteko, kiu loĝigas kontraŭ la konstruaĵo, kie antaŭ la I mondmilito kunvenis diversflanke aktiva Vilna Esperanto-Societo (1909-1915, relegu en LS n-ro 6, 2009).

V.Ŝ.

KION PRI TIO DIRUS NIKOLAO GOGOL ?

La mondgrava verkisto Nikolao Gogol verkis satiran verkon “Rakonto pri tio kiel interkverelis Ivan Ivanoviĉ kun Ivan Nikiforoviĉ”. Ĝi estas instrua precipe por esperantistoj el litova urbo *Panevėžys*, la urbo iom pli granda ol la ukraina Mirgorod (esperante – Pacurbo), pri kies moroj rakontis Gogol. Tie loĝis du tre estimataj kaj superbaj kristanoj, nobelaj Ivanoj. La aŭtoro tiel prezentis ilin: “ili estis tiaj proksimaj amikoj, kiajn la mondo ankoraŭ ne vidis”. Estis “Ivan Ivanoviĉ kaj Ivan Nikiforoviĉ kiujn la diablo mem ŝnurligis tiel, ke kien iris unu, tien treniĝis ankaŭ la alia”. Ilia amikeco estis ekzemplo por ĉiuj infanoj de la urbeto: “Vi, infanetoj, vivas inter si kiel hundoj. Prenu ekzemplon de Ivan Ivanoviĉ kaj Ivan Nikiforoviĉ. Jen kiaj amikoj, veraj amikoj! Ĝuste dignaj homoj!”. Tamen nenio estas eterna sub la ĉielo – la nedidigeblaj amikoj malpaciis! Ŝajne pro bagatelo, sed ne tute ...

Foje Ivan Ivanoviĉ ĉe sia samnomulo kaj najbaro surprize ekvidis pafilon. Tiu la pafilon posedis jam longe, sed neniam elmontradis ĝin. Povas esti li eĉ ne scis kiel pafi ... Do, Ivan Ivanoviĉ, dum longa rafinita parolado al sia dikega amiko proponis interŝanĝi la pafilon kontraŭ bonega grasa porkino. Tiu, ne subiĝis al persvado kaj fine eĉ indigniĝis: “kiu vi opinias min, proponante porkinon”. Kiam Ivan Ivanoviĉ iom post iom komencis kolereti pro la malsukcesa persvado, Ivan Nikiforoviĉ riproĉis lin: “Vi, Ivan Ivanoviĉ estas vera viransero!” Tiu ekbolis: “Kiel vi aŭdacis min, honordevenan homon, senhonorigi per tia insulta nomo!” Je miro de tuta Mirgorod (Pacurbo) la iamaj proksimaj amikoj metis terurajn reciprokajn plendojn al juĝisto. Malgraŭ multaj intervenantoj ili neniel konsentis paciĝi. Ili deklaris, ke ili ne povas vidi unu la alian! Ja ĉiam aperadis iu kiu nur akriĝis la situacion. Pasis tiel pli ol 12 jaroj, sed la juĝa proceso ne finiĝis ...

En litova Mirgorod – *Panevėžys* vivas du virinoj kiujn kunligis E-sorto. Jam antaŭlonge ili ekhavis reciprokajn riproĉojn. Povas esti la malŝato ne iĝus publika, sed unu el ili (s-rino Palmira) plendis al estrarano de LEA s-ro Algimantas kaj tiu en „Litova Stelo“ Nr.4 (2009) publikigis artikolo „Estimu veteranojn“. La alia estimata esperantistino, s-rino Lina reciproke sendis al “Litova Stelo” siajn komentojn “Onidiroj reeĥas”. Inter tiuj ni legas la atentigon: “La artikolo estis skribita unuflanke, ne objekte. La sinjoro ĵurnalisto ... ne pridemandadis alian flankon”.

Mi prezentu al estimataj legantoj ambaŭ flankojn. Unu el ili, s-ino Lina, jam dum kelkaj agoperiodoj prezidas la urban klubon “REVO”, la alia, s-rino Palmira, estis E-instruistino de Lina. Esperanto estis ilia amikiga lingvo. Jen kiel priskribas sian instruistaron s-ino Lina: “Gesinjoroj Palmira kaj Telesforas Lukoŝeviĉiai estis konataj E-instruistoj. Ili ambaŭ instruis min Esperanton: elementan kurson – sinjorino, kaj daŭrigan – sinjoro. Pro alloga, bona E-instrumentodiko la sinjorino restis estimata. Kiam mi mem E-instruis en gimnazio, mi sekvis ŝian metodikon. La sinjorino oni nomis „Bona instruistino“. Kaj jen kiel karakterizis al mi s-ino Palmira s-ninon Lina: ”Ŝi estas kapabla organizanto, bone gvidas la klubon”. Kiel bele ili parolas unu pri alia! En la incita artikolo ŝvebis la ideo, ke oni ne plu estimas veteranon, honoran membron de UEA Telesforas Lukoŝeviĉius. Mi devas sciigi al vi, ke almenaŭ nun estas male. La prezidantino klarigis:

“Mi persone estas dankema al sinjoro T. Lukoŝevičius pro tio, ke mi spertis lian protekton. Dank‘ al lia protekto, mi fariĝis E-instruistino kaj laboris oficiale en gimnazio. Li ankaŭ helpis min dum kriza momento de mia vivo”. La aŭtorino de la komentario “Onidiroj reeĥas” komprenigis nin, ke miskomprenoj kaj mistraktado venas el antaŭ 10-20 jaroj, kiam inter forpasinta Ĉeslovas Tručionis, ŝi (Lina Jablonskiene) kaj Vilius Ŝidlauskas okazis preparolo pri negativaĵoj en la klubagado kaj estis kritikita tiama vicprezidanto T. Lukoŝevičius. Nun Lina asertas tiel: “Mi konstatas, ke kun sinjoro T. Lukoŝevičius esperantistoj komunikiĝas bonvole kaj estime. La sinjoro en E-agado partoprenis, ĝis kiam li povis. Pri lia partoprenado en E-movado atestas artikoloj en presaĵoj kaj fotoj. Nun la sinjoro ne povas okupiĝi pri Esperanto pro malbona sanstato”. S-rino Lina daŭrigas: “Pri maljuneco, malsanuleco, invalideco-handikapiteco estas vana parolado. Ni ĉiuj jam ne estos tiaj samaj, kiel aspektis antaŭ 20 jaroj. Ĉiuj iame estis junaj, sanaj kaj belaj. Nun ni ofte restas nur belaj ...”

Kaj tamen, ĉu okazis ankoraŭ nenio pri kio neniu flanko deziras publike paroli aŭ skribi, sed kio difektas la rilatojn? Estas. Iam de iu esperantisto el urbeto Radviliškis, (tiam “Revon” prezidis T. Lukoŝevičius mem) por la klubo nur kontraŭ 100 Ld estis aĉetita akordiono. Nun la muzikilon gardas s-rino Palmira (kiu, kiel oni asertas, eĉ ne kapablas ludi). Ŝi ne konsentas transdoni la akordionon al la klubo. S-rino Palmira asertas, ke la akordiono estis aĉetita per mono de ŝia familio. Laŭ la prezidantino de “Revo” por la muzikilo estis pagita la mono el la kluba kaso. Dokumentoj pri aĉetado, verŝajne, forestas tial neniu flanko povas pruvi sian pravecon ... Se LEA havus propran juĝistaron, povas esti, la malpacigintaj la aferon metus al ĝi ...

La nunan, tute normalan, kluban atmosferon prezentas Valdonė Skujienė per artikoleto en impona la kluba monata informilo de „Revo“ (n-ro 1 /15, redaktas Vilius Ŝidlauskas):

“Traleginte artikolon „Estimu veteranojn“ mian koron trafis la sento de amareco. Laŭ mia opinio ĉiuj geesperantistoj estimis kaj estimas geesperantistojn Palmira kaj Telesforas Lukoŝevičius. Neniu forstrekos ilian instruon kaj eldonan agadon, konatan en la urbo Panevėžys kaj Litovio. Mi rememoras unu frazon, diritan de estimata Telesforas Lukoŝevičius, kiam ni pasintjare (2009) revenis el iu kunveno: „Multaj homoj estis min insultintaj dum la vivo, sed mi al ĉiuj pardonis.“ – Kaj mi ekpensis, kia grandanima homo estas Telesforas Lukoŝevičius!”

V. Skujienė finis tiel: “Al mi tre plaĉas la instruoj el la libro de Roberta C. Bondi „Ami kiel Dio amas“. Tie Dezertaj Patroj klarigas: „Neniu povas juĝi aliulojn, ĉar unusola Dio scias, kiel kaj kial la homoj kondukas tiamaniere aŭ alimaniere.“ Jes, mi ĝuste ne scias kiaj vundoj (eble el tre fora tempo) estis restintaj en subkonscioj de P. Lukoŝevičienė, L. Jablonskienė kaj Ĉ. Tručionis. Al ĉiuj geesperantistoj mi proponas tralegi la artikolon „PARDONO – KURACILO SEN RISKO DE FLANKAJ EFIKOJ“.


Interese, eble la pasinta Sankta Pasko jam pacigis la flankojn? Aŭ ili atendas venon de Nikolao Gogol al la pacurbo *Panevėžys*?

V. Ŝilas, redaktoro de *LS*

Malfortulo ne kapablas pardoni. Pardonemeco estas kvalito de fortuloj.

M. GANDHI

Forpasis E-veterano Aloyzas VALA



La 27-an de marto 2010, en Vilna malsanulejo, ĉe sia 67-a vivojaro forpasis iam tre aktiva esperantisto, fizikisto, inĝeniero, tradukisto, optimisma avo Aloyzas VALA.

A. Vala naskiĝis en familio de arbaristo la 1-an de septembro 1943 ĉe urbeto *Kėdainiai*. Post kiam la familio translokiĝis al Vilno, li ĉi tie eminente finis mezlernejon kaj en 1961 studentiĝis en Vilna universitato. En 1967 li finis ties fizikan fakultaton kaj tuj eklaboris en Sektoro de teoria fiziko de Scienca Akademia Fizika Instituto. Pli poste li laboris kiel teknologia inĝeniero en uzino de televidaĵoj. Dum lastjaroj A. Vala okupiĝis pri tradukado el raraj lingvoj (finna, hungara k.a.). Dum tuta sia vivo A. Vala manifestiĝis kiel vera patrioto de sia patrujo Litovio.

Esperanton A. Vala eklernis en 1962 kaj tuj aliĝis al Vilna junulara E-klubo "Juneco" (funkcianta ankaŭ nun!). Dum kelkaj jaroj li estis estrarano de "Juneco" kaj dum 1964-1965 prezidanto de "Juneco". A. Vala partoprenis en diversaj turistadoj de la klubo, partoprenis en kelkaj BET-oj, en 1967 estis unu el organizintoj de SEJT-9 (Sovetunia Esperantista Junulara Tendaro). En 1968 okazis lia E-nupto - li edziĝis al aktiva esperantistino Marija Vilaniškytė (nun Valienė, inĝenierino-tradukistino) kaj kune ekhavis geknaban paron, filinon Jurgita (nun kemiistino) kaj Adolfas (fizikisto). Surfote A. Vala aperis kun sia nepo

La 30-an de marto 2010 en funebrejo de Matulaitis-preĝejo okazis sepultado de la forpasinta Aloyzas Vala. Samtage li estis forakompanita al Vilna *Karveliškės*-tombejo.

Pro la forpaso de s-no Aloyzas Vilnaj esperantistoj esprimas kondolencojn al la vidvino kaj iliaj gefiloj.

Vytautas Šilas, redaktoro de "Litova Stelo", fondinto de "Juneco"

Forpasis Ĉeslovas Liubomiras TRUČIONIS

La 10-an de marto 2010, en sia 74-a vivojaro, post longa malsanado, en hospitalo de *Kaunas* forpasis iniciatema esperantisto Ĉeslovas Liubomiras TRUČIONIS. Dum kvin jaroj (1998-2003) Ĉ.L. Tručionis estis estrano de Litova Esperanto-Asocio.

Ĉ. Tručionis naskiĝis la 11-an de februaro, 1937 en urbo *Panevėžys*. En 1953 li finis tiean mezlernejon (nun gimnazio) kaj samjare studentiĝis en loka Hidrodrenada teknika lernejo. Li fariĝis profesia drenisto, dum kelkaj jaroj ĝis emeritiĝo li laboris en gravaj postenoj de regiona administracio de *Panevėžys*. Pri Esperanto Ĉ. Tručionis ekinteresiĝis en 1959 kaj aktive agi en la movado komencis en 1988. En 1989 laŭ lia iniciato en *Panevėžys* estis fondita nova Esperanto-klubo "Revo". En 1993 li estis elektita prezidanto de la klubo. Post kelkjara paŭzo, kiam la klubon gvidis aliaj, en 2003, li denove fariĝis prezidanto de "Revo". Dum 1990-1995 li en *Vilnius* partoprenis kurson de tradukado kaj de tiu tempo esperantigis kelkajn verkojn de litovaj verkistoj al Esperanto.



Laŭ iniciato de Ĉ. Tručionis en *Panevėžys* estis fondita eldonejo de E-literaturo. Tie aperis ankaŭ lia antaŭlasta traduklaboro "Ombro de meditoj: aforismoj kaj miniaturaj" (la aŭtoro Leonas Bušma). La lasta estis la novelo de J. Kundrotas "Vekiĝu" (pri tragikaj litovaj libroportistoj en epoko de cara jugo). Antaŭ lia enhospitaligo ĝian tekston por publikigo ricevis Litova Stelo". Cetere, Ĉ. Tručionis kontrolis la lingvon de samurbaj esperantistoj kaj redaktis multajn eldonaĵojn de tiu kluba eldonejo. Dum 1999-2000 li eldonadis informbultenon "Lumturo", destinitan por esperantistoj de sia regiono. En 2007 li kreis personan retgastejon www.liubomiro.puslapiai.lt. La gastejo enhavis ĉapitrojn: *Pri mi, Esperanto en Panevezys, Agrablaj momentoj, kluba vivo*. Cetere, inter la agrablaj momentoj de sia E-vivo li menciis la grupan gastadon ĉe E-veteranoj Telesforas Lukoševičius kaj lia edzino Palmira (en ŝia bieno).

La entombigo de Ĉeslovas Liubomiras TRUČIONIS okazis la 13-an de marto (sabate). Ni sincere funebras kaj kondolencas liajn familianojn kaj proksimulojn.

Povilas JEGOROVAS,
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

VEKIĜU!

Eseo pri libroportisto Jonas Povilaitis (1855-1910), kamparano el bieno ĉe Ŝeŝupė - limrivero inter tiama Rusa imperio kaj Orienta Prusio. Li estis peranto de doktoro Vincas Kudirka (1858-1899), heroldo de litova nacia renaskiĝo. La teksto estas prenita el memorlibro "La sankta epoko libroportista" de **Juozas Kundrotas** ("Knygnešiu šventa Gdynė", Kaunas, 1990)

La 16an de novembro en 1899, mornan tagon, kiam mortis V. Kudirka, tra Prusi-Rusilima marĉo stumble ŝlimtretis kontrabanda libroportisto Jonas Povilaitis kun peza portaĵo da libroj.

Vincas Lauraitis

La boato puŝiĝis al riverbordo, kaj Jonas eksentis la manon de boatisto sur sia ŝultro. Tio estis instigo kaj bondeziro pluri kun Dia beno laŭ propra nur memkonata vojo. Ankoraŭ maltrans la rivero li pagis la boatiston, alie ĉi prusiano apenaŭ elirus el sia domo tian nokton. Jonas manpremis lian dekstran kaj tiel impete surŝultrigis la pezan portaĵon, ke la boato ekŝanceliĝis, kaj ĝia mastro devis remile apogiĝi al la riverfundo.

Tuj, kiam Jonas Povilaitis paŝis sur la bordon, kovritan de arbustaro, la boato malaperis en la nigro de rivero, hirta pro forta vento. Kelkan tempon aŭdeblis plaŭdado de ondoj kontraŭ ĝiaj flankoj, kvazaŭ manklakado.

Hieraŭ, kiam li estis irona al Tilzito*, pluveto nur iom malsekigis lian vizaĝon kaj okulharojn, sed hodiaŭ la vetero furiozis. Ĉio degelis, kotigis, la piedoj sinkis en grundon kiel en farunkaĉon. Singardo kaj rigardo vanis pro densa mallumo – kvazaŭ en peĉamaso. Rapidante oni riskus tordi la kolon aŭ trafi en la manojn de epoletulo.

Post longa kaj malcerta marŝo ankoraŭ malproksimis la unue vizitenda urbeto *Naumiestis***, kaj poste atendis plia piediro al *Ŝakiai***, sed almenaŭ jam estas pasita la plej grava etapo - la rivertransiro. La mallumo kaŝis la boaton, sed ĝi kaŝis ankaŭ la gardistojn de la limo. Foje tuj post transiĝo li renkontiĝis okul-al-okule kun embuskanta moskvulo. Bonŝance li ĝustatempe lasis la portaĵon al riverfluo. La juna soldato tutegale irigis lin al la limposteno, sed la liphara oficiro bezonis librojn - pruvon pri kontraŭleĝa transportado. Ne sufiĉas nur kapti kontrabandiston. Ne sufiĉas. La soldato nur konfuzis silentis kaj mordis la lipon, sed ellasante el la postenejo minacis: "Atendu, mi trafos vin kun libroj...". *Tfu-tfu!* Favoru, fortuna! Dume ne kaptiĝis, kvankam kelkfoje apenaŭ preteriĝis, kaj printempe ĝendarmo sekvis lin preskaŭ ĝis *Naumiestis*, sed ankaŭ tiam la fortuna favoris libroportiston.

Ĉe la penso pri *Naumiestis* aperis vizio de la dometo kun pala lumo en la fenestro, Doktora kapo kliniĝanta super libroj kaj manuskriptoj, kaj varma ondo fluis tral la koro. Tiam, en *Ŝakiai*, ilin interkonatigis instruisto Stalioraitis. Doktoro ŝajnis neatingebla, fiera, plena de amara sarkasmo, kun pika esplora rigardo el profundaj orbitoj. Tamen informite ke Povilaitis sekrete transportadas litovajn eldonaĵojn el Prusio, Doktoro tuj vigliĝis:

“Pro Litovujo nia klopodado, sole pro Litovujo vi, libroportistoj, penegas sur vovoj sinkaj kaj danĝerplenaj... La popolo memoros vian sinoferon senprofitan ...”

Dankemo kaj ĝojo pleniĝis en Jonas. Ne pro memoro. Pri ĝi li ne pensis. La vorto mem POPOLO lin varmigis. Estis io nova, signifa, esperiganta, kvazaŭ la aŭroro ĉe horizonto.

“Pro kio, Doktoro...” – sin klinis la libroportisto penante elekti la ĝustan, plej gravan vorton.

“Homo ne estas Dio, ĉiuj homoj havas siajn difektojn kaj mankojn, kaj ne humiliĝu antaŭ aliulo, - diris Doktoro. – Humiliĝante oni cedas sin al la manoj de alia. Kliniĝi, humiliĝi signifas paciĝi kun ĉio, kion trudas la registaro, potenco, aliaj pli povaj. Tio estas sklaveco. Forta persono ne humiliĝas. Oni fariĝas homo nur konservante sion.”

Post tia interparolo, post tiaj renkontiĝoj oni povas denove kelkan tempon spiri pli profunde, spiri, akiri kuraĝon por vivi kaj agi...

Naturo pridonacis Doktoron per saĝo kaj prudento, donis al li koron plenan de homaj pasioj kaj kompato al aliaj, tamen avaris sanon kaj korpan forton. De tago al tago li estas konsumata de ftizo, tudas kaj febras. Ĉiam pli longe restas en lito. Tiam adiaŭante li diris: “Eble la lastan fojon ni intervidas...”

“Kion vi, Doktoro? Ne diru tion...” – Povilaitis konsterniĝis kaj ne trovis respondon... Doktrotro nur balancis la kapon kaj ordigis klapon de la mantelo sur ostecaj ŝultroj. Lia trankvila tono kaj tro malrapida movo tute afliktis Povilaitis. “Disinjoro, forigu de ni malfeliĉon! Lasu vivi ĉi grandan viron! Kun li fortiĝas nia kredo je estonteco” – pensis li tiam. Sed nun malbona antaŭsento ne forlasas kaj turmentas.

Hu! Subite aŭdiĝis paŝoj. Pezaj botoj ŝmace plaŭdis sur akvoŝvela muskejo, pli kaj pli proksime!

Povilaitis kaŭriĝis en arbustaro, susuranta de pluvo. Laŭtas la paŝoj de soldato, sed kiom bruas lia propra anhelilo! Ŝajnas, ke de ĉiu ekspiro vibras la aero. Kvankam li penas spiri nur per supra pulmoparto, sed ekstremis branĉeto sur alia arbedo – jen, tute apud la patrolanto, kaj tiu ĉirkaŭrigardas, tamen, dank` al Dio, sin turnas al alia flanko. Al nigra akvo. „La fervorulo!“ – penetris konjekto, kvankam Povilaitis ne vidas lian vizaĝon, nur malhelan silueton. Tiam la nokta mallumo subite disiĝis kaj li distingis en lunekbrilo junan armitan soldaton, jam ne unu fojon viditan. Nu ne, tiu ĉi ulo ne subaĉetebblas, – konsideris la libroportisto. – Rigardo angora, esplora, atentema. Iam mateniĝe sidante en arbusto mi observis vin, eble impresitan de aŭroro aŭ karaj rememoroj, kaj konsideris alie: kion oni povas fari, tia estas la soldata sorto. Mi eĉ domaĝis vin, soldato juna, kiam vi staris premante la fusilon,

de tempo al tempo ririgardante al Oriento, de kie vi estis sendita ĉi tien. Ĉiu homo havas sian patrolandon, kaj ĝi estas kara kaj sankta por sia filo. Ankaŭ vi devas kompreni, kial ni linkopaŝe ŝteliĝas tra la limo kaj iras-reiras nian teron. Almenaŭ, pensis mi, tiel ĝis mi trafis en viajn manojn. Homo estas destinita por vivi kun aliaj, sed nun aperas tute male: homo sin gardu de aliaj homoj. Ĉu vi, juna soldato, perceptas, kiom terura tio estas? Kaj kio estas por vi patrolando, kio estas Litovio – ĉu Nordokcidenta Lando*** kio sufiĉu al vi laŭ la nomigo de via komandanto? Soldateto, mi povus vin kompreni, vi estas ja homo same kiel mi, nur malsame vestita. Tamen diferencas niaj konscioj. Por vi estas tutegale gardi limon Litovian aŭ alian ajn. Vi estas ofica rolo, plenumilo. Tial vin regas nek ĝojo, nek paco. Ĉu vi, alkomandita el stepa vastejo, fartas komforte en mia malgranda tero? Vi ne povas senti tion, kion sentas mia animo. Eĉ timon ni sentas malsame, kaj ankoraŭ restas nekonate, kiu el ni timas pli, kies el ni timo estas pli granda – ĉu via aŭ la mia – pro absurda servo, ke la epoletitaj ĉefoj povas ion suspekti kaj kulpigi, aŭ mi, persekutita kaj pafita, multon spertinta, sed Siberion ĝis nun evitinta?

Subite ekstazo plenigis la libroportiston: oni gardas, oni timas, sekve Litovio vivas! Tion, kio ne ekzistas, oni ne bezonas timi. Vekiĝis Litovio, kiam "Auŝra"**** ekbrilis, maldormas sub sonorado de "Varpas"****. Pro tio ne estas por mi domaĝe sub arbusto kaŭri. Starado enuigos vin, soldateto. Sed mia pacienco ne elĉerpiĝos. Kiom griza iĝus la vivo, se ni ĉesus kredi je la estonteco! Mirige estas konvinkiĝi pri la ekzisto, realeco de la mondo, pri fareblo de tio, kion alia ne kapablas, ne povas. Kio restus de vi, Jonas Povilaitis, se vi forlasus la esperon kaj danĝeron de la kurierado al Prusio?

Aha, jen tedis al vi fine! Mi diris ja. Eble ne tiom longe vi staris ĉi tie, sed por mi, streĉe fleksite sub arbusto, testude rampis la tempo. La libroportisto frotis, reflektis-etendadis la rigidajn gambojn kaj ĉirkaŭrigardante ekmarŝis tra la kampoj, evitante vojojn kaj dormemajn hejmojn. Litovio ŝajne letargiis sen sia skribo kvazaŭ sen lanterno.

Ie postrestis la ŝlimaj padoj kaj venta blovado. Jam tuj apude estis urbeto, kiun li aliris per vojetoj nur memkonataj. Metinte gazetojn kaj librojn en sekretita kaŝejo, observante la nigrecon de la ĉielo, Povilaitis atingis la domon, en kiu loĝis Doktoro, kaj jam estis ŝovonta vergeton sub la lignan ŝtupon laŭ interkonsentita signalo, kiam subite tra la malhela kurteno li ekvidis du palajn lumetojn. Kaptite de ektimo, li rigardis al la enigma fenestro kaj pelis de si teruran antaŭsenton. Vane li atendis el trans la pordo iun sonon, obtuzan tuson, aŭ ekleviĝon de la kurteno kun broditaj rutfolietoj por ekvidi la vizaĝon, palan kiel tiuj lumetoj. Kaj kvazaŭ puŝite de stranga impeto li preskaŭ falis internen. Pro malfermata pordo treme ekflirtis du kandeloj, lumigantaj vaksan vizaĝon kun kavaj vangoj kaj la manojn, kunmetitajn surbruste. Ĉe la mortinto sidis lia flegantino Marcelė Barzdaitytė, kiu eĉ ne rigardetis al la veninto, nur senĉese balancis la kapon. Vaksodoro kaj prema silento. En la lumo de flirtantaj kandeloj la ĉambra spaco jen vastiĝis jen ŝrumpiĝis. Tia vidaĵo tiel dolorige tuŝis, ke la libroportisto ne plu retenis emocion kaj larmojn, ruliĝantajn tra la

vangoj. Li tute ne hontis plori antaŭ ĉi tiu servistino kun nigra tuko sur la kapo, kaj ne penis kontroli sin. Li genuis ne sentante la malmolon duron de la planko, kovrite per malvarma ŝvito kaj aŭskultante la bruojn de la nokto, degelantajn kiel vakso. Kaj li sentis sin prirabita – de la sorto aŭ nekonate de kio...

En kutima loko sur la muro ripozis la violono. Ĝi estis same silenta, koncentriĝinta kaj kvazaŭ atendanta ektuŝon de arĉo. Solena melodio ekaŭdiĝis al Povilaitis – ritme proksimiĝanta, fortiĝanta. Sufokitaj senordaj pensoj klariĝis kaj heliĝis. Kaj li jam aŭdas potencon gongon de la sonorilo: VEKIĜU! VEKIĜU! VEKIĜU!

La traduko estis trovita inter la manuskriptoj de **Ĉeslovas Liubomiras Truĉionis**, forpasinta en Panevėžys la 10an de marto 2010, antaŭtage de la 20a datreveno de la dua sendependiĝo de Litovio.

La tradukon lingve reviziis Valdas Banaitis

*Tilzit (litove Tilžė, post 1945 – ruse Sovetsk en Kaliningrada regiono) - urbo de Orienta Prusio sur la suda bordo de rivero Nemunas (Nemano aŭ Njemeno, laŭ PIV) kun grava ponto ŝosea kaj fervoja

** Naŭmiestis, **Ŝakjaj** – litovaj urbetoj oriente de rivero Ŝeŝupė (Ŝeŝupe), suda alfluo de Nemano (PIV)

*** Nordokcidenta Lando (ruse Sjevoro-Zapadnyj Kraj) – oficiala nomo de eksa Litva Princlando post la anekso al la Rusa Imperio en 1795, kiam pro la unua ribelo estis malpermesita mencio de la nomo. Post la dua ribelo en 1832 estis fermita Vilna Universitato, post la tria en 1864 estis malpermesita presado kaj kolportado de litovaj libroj en latina alfabeto.

**** “Auŝra” (aŭŝra), “Varpas” - titoloj de unuaj litovaj gazetoj, respektive "Aŭroro" kaj "Sonorilo", presataj en Orienta Prusio kaj nelegale kolportataj tra Litovio de 1883 ĝis la ĉeso de Cara presmalpermeso en 1905.



TEJO – Tutmonda Esperantista Junulara Organizo ĝoje anoncis, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tiel estis decidite dum lasta reta estrarkunveno. La aranĝo okazos julie 2011 proksime de Kijivo, la ĉefurbo de Ukrainio.

Temo proponita por la kongreso estas "Stabila evoluo - nova koncepto por homaro". La organizon teamon kreas UkrEA (Ukrainia Esperanto-Asocio) kaj ULEJ (Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo). Tio estos la unua IJK en Ukrainio. Cetere, la kongresejo troviĝas proksime de la Kijiva akva rezervejo.

Ni memorigas, ke, la 66-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Havano, Kubo.

Pliajn informojn pri ĝi serĉu ĉe la <http://tejo.org/ijk/2010>.

TUTTAGA EKSKURSO AL AŬKŜTAJTIA NACIA PARKO

Aŭkŝajtio (litove: *Aukštaitija*) estas historia, geografia kaj etnografia parto de Litovio kie regas aŭkŝajta dialekto de litova lingvo (kun subdialektoj). Cetere, la teritoria nomo *Aukštaitija* estas registrita en fino de XIII jarcento. La plej gravaj urboj de *Aukštaitija* estas *Panevėžys* (Panevejis) kaj *Utena* (Utena). Oriente, inter *Utena* kaj urbeto *Ignalina* situas la plej impona en Litovio – Aŭkŝajtia Nacia parko. La parko do situas en la orienta parto de Litovio, preskaŭ 40 kilometrojn sude for de *Visaginas* – la kongresurbo de **BET**.



Aŭkŝajtia parko okupas 40000 hektarojn kaj enhavas 200 lagojn, inter si kunligitajn per riveroj kaj riveretoj. La akvoj okupas preskaŭ 16 procentojn, arbaroj kovras 69 procentojn de parka teritorio. La parko enhavas kvar etnografiajn vilaĝojn.

En la unustrata vilaĝo *Ginučiai* vi povos vidi malnovan 200-jaran akvomuelejon. Dum la varma kaj suna vetero estos ebleco sin bani. De sur monteto *Ladakalnis* (la pagana Diino **Lada** naskis la monton) malfermiĝas belega panoramo kun ses lagoj. La ekskursanoj vizitos muzeon de abelbredado. Laŭ litova mitologio la Dio de abeloj estas *Bubilas*. En la muzeo unu abelfamilio loĝas en la skulptaĵo de *Bubilas*. En la vilaĝo *Palūšė* – la turisma centro de la parko – staras ligna okangula sonorilejo, kiu estis konstruita en 1750. Tute apude la ekskursanoj havos lunĉon en „Aukštaičių užeiga“ (Taverno de aŭkŝajtoj) – la restoracio en nacia stilo.



Ĉiujare la parkon vizitas multaj aŭto- kaj akvo-turistoj, eksterlandanoj eĉ el Japanio kaj Aŭstralio. Mi ĝojas, ke nun ankaŭ vi, partoprenantoj de BET, havos la eblecon ĝui unikan naturon kaj originalajn parkajn vidaĵojn.

Antanas VISOCKAS, ekskursgvidanto

Britoj prezentis UEA por NOBEL-premio

Brita novaĵagentejo BBC raportis, ke **dek membroj de Brita parlamento** prezentis Universalan Esperanto Asocion (UEA) **por Nobela Pacpremio** de la jaro 2010. Inter la parlamentanoj estas Charles Kennedy, antaŭa partigvidanto de Liberalaj demokratoj. Ĉiuj parlamentanoj skribe konfirmis sian decidiĝon kaj sendis oficialan proponon al la Norvegia Nobela Instituto por nomumo de Nobela Pacpremio (NO-0255 OSLO Henrik Ibsen gate 51).

La listo de la proponintoj estas jena:

- **Lord Robin Corbett**, laborpartiano
- **Bill Etherington**, laborpartiano
- **Roger Gale**, konservativulo
- **Oliver Heald**, konservativulo
- **Sadiq Khan**, laborpartiano
- **Charles Kennedy**, liberaldemokrato
- **Lord Bob Maclennan**, liberaldemokrato
- **Rob Marris**, laborpartiano
- **Austin Mitchell**, laborpartiano
- **Andrew Smith**, laborpartiano

Al la Nobel-centro la britaj parlamentanoj prezentis la aferon tiel:

"Movado kaj aktivado de UEA subtenas lingvan variecon, kaj liberecon por homaro kaj formiĝo de universala kulturado, kio entute efikas reformon, ankaŭ konservon de homara paco.

Rezulte la atento al la efika aktivado de ĉi asocio pri influo al internacia komprenemo, kio estas baza afero por organizi mondan pacon, kandidatigas la asocion por preni ĉi jaran Nobel-premion."



ESPERANTO – MOZAIKO

☆ **Humuraĵoj.** Fine de 2009 en litova urbo *Panevėžys* aperis 80-paĝa kolekto de diverspopolaj humuraĵoj "Ridu kun ni I. Por etuloj kaj plenaĝuloj". Ĝi estas jam la 18-a libro el tiel nomata serio "Panevezys-a biblioteko de Esperanto", eldonata de tiea E-klubo. La kolekton kompilis kaj lingve kontrolis **Palmira Lukoševičienė**. La libro estas akirebla en oficejoj de Litova E-Asocio en Kaŭno kaj en Vilno, en libroservo de UEA kaj en E-klubo de *Panevėžys*.

☆ **BBC prezentis Esperanton.**

11.01.2010, en la BBC1 programo 'The One Show' tra tuta Britio estis dissendita frapa kaj lerte farita priesperanta filmeto. La raportisto, ĝenerale interesata pri lingvaj temoj, intervjuis nian kolegon **Tim Morley**, kiu parolis pri Esperanto kaj poste pruvis kun universitataj studentoj ĝian kompreneblon kaj facilecon. La stabo de la filmo vizitis lernejklasson, kie Tim kadre de la Spingboard-projekto instruas Esperanton. La kantado de la infanoj vere ĉarmis la spektantojn. Poste la raportisto vizitis la geedzojn Page kiuj helpe de Esperanto interkonatiĝis kaj edukis siajn infanojn en Britio.

<http://timsk.wordpress.com/2010/01/11/programero-pri-esperanto-ce-bbc1/>

☆ En la populara litova interreta paĝaro "Pinigu karta" (Mona generacio) 16.04.2010 aperis intervjuo kun Vilna esperantisto **Gediminas Degėsys**. Oni diskutis

pri facileco de Esperanto kaj ties perspektivoj sur la internacia scenejo. Laŭ G. Degėsys jam post kelkmonata lernado eblas ellerni flue paroli la artefaritan lingvon. Ĉiam kreskas nombro de esperantistoj – en Litovio jam estas ĉirkaŭ 5 mil parolantoj. Tamen, eĉ la plej optimismaj el ili ne kredas, ke Esperanto povas fariĝi lingvo internacia.

⌘ KORESPONDA KESTO ⌘

Mi estas 40-jara pola instruisto, feliĉa edzo kaj patro. Mi tre ŝatas labori kun infanoj kaj junuloj, vojaĝi, foti kaj ricevadi fotojn, ekkonadi



interesajn homojn. Antaŭ ĉio per la korespondado mi volonte ekkonadas diversajn landojn: loĝantojn, kutimojn ktp. Ĝenerale mi estas tre gaja homo, kiu amas Esperanton kaj amikecon inter nacioj.

Radoslaw Sienicki

Biale – Szczepanowice 10/4
PL 07-325 Boguty, **Pollando**

drks@op.pl

☆☆

Skribante korespond-peton bv. indiki vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj preferojn.

Kune kun via korespond-peto ne forgesu sendi al litovastelo@takas.lt ankaŭ vian foton, kiun ni publikigos kune kun via anonco!

RIDETU KUNE!

☺ INTERESE KIAL

Interese, kial juristoj dum divorco
interesiĝas ĉe ambaŭ
flankoj pri motivoj de disiro,
sed ĉe geedziĝo – neniam. Kial?



☺ DIVERSAJ OPINIOJ

- Peĉjo, mi aŭdis, ke vi edziĝas!
- Nu, jes!
- Kaj kia estas la estonta edzino?
- Kiom da homoj, tiom da opinioj. Al miaj amikoj ŝi plaĉas, al mia paĉjo ne!

☺ PRI ALIAJ PLANEDOJ

Nia mondo, la Tero, militas, masakras, rabas, detruas. Ĉu ekzistas pli saĝaj mondoj? Ekzistas! La plej okulfrapa pruvo, ke saĝaj estaĵoj en la universo ekzistas estas la fakto, ke ĝis nun neniu el ekster la Tero deziris kontakti kun ni.

☺ HELPU, ĈIELO!

Iu altrangulo malfruiĝis al gravega kunsido. Finfine alveturinta, li neniel povis trovi lokon por parkado. Pro la senesperigo li levis ambaŭ brakojn kaj laŭte ekpetegis Dion:

– Dio mia, helpu al mi trovi liberan parkokon! Se Vi tion faros, mi ĉesos drinki, ne plu diboĉos kaj ĉiudimanĉe frekventos preĝejon.

Subite la viro vidas – tute apude estas libera loko! La viro denove rigardas al la ĉielo kaj murmuris:

– Ĉio, mi jam ne bezonas de Vi parkokon – mi mem trovis ĝin ...

☺ EL REMEMOROJ DE POPULARA KANTISTO

Komence de mia kariero junaj knabinoj diradis al mi: “Mi amas vin, mi adoras vin!” Poste oni flatis min tiel: “Mia paĉjo vin amas, mia panjo vin amas!” Antaŭ nelonge mi ekaŭdis: “Mia avino tre adoras vin!”

PERANTOJ *de* LITOVA STELO

BELGIO: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 ANTWERPEN
 BELORUSIO: Eŭgenija Pečkova, Nadeždinskaja 11-2-23, BY-220006 MINSK
 BRAZILIO: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, BR 70084 – 970 BRASILIA, DF
 BRITIO: Viv O` Dunne, Stacion Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST 12 9DE
 ĈEĤIO: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 PODĚBRADY II
 DANIO: Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK-2100 KØBENHAVN Ø
 ESTONIO: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 KURESAARE
 FRANCO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS
 GERMANIO: EsperantoLand e. V. Berlin, s-ro Lu Wunsch-Rolshoven,
 Wiclfstrasse 9, DE-10551 BERLIN
 HISPANIO: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 SABADELL
 ITALIO: Viŝnja Brankoviĉ, Via Parini 5, IT-34129 TRIESTE; tel/fax +39/40/767875
 IRLANDO: Rūta Vaičiūnaitė, DUBLINO, ruta64@centras.lt; tel. +353 8762 78929
 LATVIO: Margarita Želve, Rūpniecibas 35-13, RĪGA LV-1045
 MAKEDONIO: Esperanto-Societo "La Progreso", p.f. 197, MK-7500 PRILEP
 NEDERLANDO: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM
 POLLANDO: Robert Kaminski - ul. Kwiatowa 1 m 3, PL-94-227 LODZ, lodzano@nestrada.pl
 RUSIO: Halina Gorecka, ab. ja. 1248, RU-236039 KALININGRAD
 SVEDIO: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 –35 HÖRBY
 UKRAINIO: Mikaelo Lineckij, av. Heroj Stalingrada 42-v-64, UA-04213, KIEV;
ml@esper.kiev.ua
 USONO: E.L.N.A., Esperanto-USA, 1335, Stanford Ave Suite 300, Emeryville Ca 94608

PERANTOJ EN ALIAJ LANDOJ ESTAS SERĈATAJ!

La revuon Litova Stelo vi povas aboni ĉe la perantoj, ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la administracio de Litova E-Asocio (LEA, ab. D. 167, LT-44002 Kaunas-C; litova.ea@mail.lt).

Se vi ĝiros la pagon rekte al nia konto *litv-s* ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 Rotterdam, Nederlando, vi pri tio mem nepre informu la administracion de LEA (ne la redaktoron) kaj sendu al ĝi via(j)n adreso(j)n.

ATENTU LA ABONPREZOJN ! Ili ne altiĝis !!

Por Litovio: jarabono 20 Lt; unuopa n-ro 4 Lt; malnova jarkolekto 10 Lt.
 Por landoj de eksa Sovetio: jarabono 7 €; malnova jarkolekto 4 €.
 Por eksaj socialismaj landoj: jarabono 10 €; unuopa n-ro 2 €;
 malnova jarkolekto 5 €.
 Por ceteraj landoj: jarabono 14 €; aerpoŝta aldono 6 €;
 unuopa n-ro 3 €; malnova jarkolekto 7 €.

Pro falanta kurzo de USD ni indikas abonprezojn nur en EUROj.

La abonado senlimdata! - ĉiu aboninto ricevos ses numerojn de la jaro!

Lietuvos žvaigždė ISSN 1648-4185 Lietuvos esperantininkų sąjungos žurnalas
 2010 m. Nr.3. Baigta redaguoti 2010.04.24.

SL Nr 797. 2 sp. lankai. Ofsetinė spauda. Tiražas 600. Užs. 10-...
 Spaustuvė "MORKŪNAS ir Ko", Draugystės g. 17, LT-51229 Kaunas-31.